3/2000
Aprilo/Majo
Bulteno de Hamburga Esperanto Societo r. a.

Neu in unserer Bibliothek:

Esperanto - das neue Latein der Kirche

Rechtzeitig zum Katholikentag in Hamburg zu Himmelfahrt 2000 erscheint dieses Buch von Dr. Ulrich Matthias. Auf 125 Seiten spannt er den Bogen von der historischen Betrachtung der Idee einer Universalsprache, über die Geschichte des Esperanto bis zu Fakten über Kirche und Esperanto und die Anwendung von Esperanto unter katholischen und evangelischen Christen. Der Stil des Buches ist erfrischend sachlich, eine große Anzahl von Zitaten untermauern das Gesagte und machen das Buch lebendig. Ein wertvoller Beitrag zur Werbung für die internationale Sprache und eine interessante Lektüre.

Neu in unserer Bibliothek:

Pachjo, kio estas rasismo?

Nach dem großen Erfolg auch in Deutschland unter dem Titel "Papa, was ist ein Fremder" liegt nun auch die Esperanto-Version dieses 52-seitigenBüchleins von Tahar Ben Joullon vor. Joullon, in Frankreich lebender Marokkaner, schrieb den Text für seine kleine Tochter, um ihr die für Kinder so komplizierte und unverständliche Materie von Rassismus und Fremdenfeindlichkeit zu erklären. Daher ist das Buch in einer einfachen, auch für Esperanto-Anfänger gut verständlichen Sprache gehalten. So läßt sich beides verwirklichen: ein interessantes Buch zu einem allgegenwärtigen Thema lesen und Esperanto üben.

Beide Bücher sind ab sofort in unserer Bibliothek zu finden. Einige Exemplare stehen auch zum Verkauf zum Preis von 12,80 DM (Pachjo, kio estas rasismo) bzw. 19,80 DM (Esperanto - das neue Latein der Kirche) bereit.

Dank für Bücherspende

An dieser Stelle möchten wir Familie Hüttinger danken. Aus dem Nachlass des verstorbenen Herrn Hüttinger wurden unserer Bibliothek einige Bücher übereignet, die wir in unseren Bestand übernehmen konnten.

Enhavo	Editorajhoj
1. Sentenco 2. Karaj legantoj 3. Ni komencu ekzerci plu 4. HES decidis 5. Printempa purigado 6. Nia programo 7. 22-a ^CBP en Mielno 8. Kiel: Esperanto en urba biblioteko 5-a Hansa Esperanto-Tago en Kijlo	Redaktofino de Esperanto Hamburg n-ro 4/00: 18-05-2000 Eldonanto: *Hamburga Esperanto-Societo r. a.* Klaus-Groth-Str. 95, D-20535 Hamburg Tel/Faks: +49 40 250 30 65 Prezidanto: Jürgen Wulff http://www.juergenwulff.de Redaktoro: Frank Merla http://members.aol.com/MerlaFrank
La HES Klubejo estas malfermita Jhaude ek de 19:00 h. Programo: 20:00 h. GIS: kunvenoj laubezone; Informoj: Tel. (040) 58 71 82 au 39 19 44 14	Das Haus des Esperanto Vereins Hamburg ist geöffnet donnerstags ab 19:00 Uhr. Programm: 20:00 Uhr GIS: Zusammenkünfte nach Bedarf; Information: Tel. (040) 58 71 82 oder 39 19 44 14

Karaj legantoj!

La nova kasisto petas vin kontroli chu vi jam pagis vian membrokotizon por 2000. La ne pagintaj membroj estas petataj nun pagi.

La redaktoro ghojas pri artikoloj ne nur de novaj membroj. Do, ne hezitu, skribu!

La klubo shatas interesajn klubvesperojn. Certe ankau vi havas temon por pezenti dum jhauda vespero. Anoncu vian temon che Benno Klehr!

Dankon diras

Frank Merla

Enhavo

Sentenco

Ankau se chiuj estas samopiniaj, chiuj povas malpravi.

Bertrand Russel

Enhavo

Ni komencu ekzerci plu!

La pasinta estrarkunsido akceptis mian proponon ôanêi la kutiman tagordon de niaj îaudaj renkontiêoj.

Ne timu!

Estas nur tre malgranda afero, sed nun mi volas iomete klarigi tion:

Mi substrekas ke la HES prezentas por ni bonegan forumon. Ch tie ni povas ekscii ke nia amata lingvo vivas!

Sed malgrau tio, estas tre malfacile por komencantoj paroli en Esperanto libere. Nur auskulti estas ja pli komforte! Kompreneble la komencantoj tiamaniere restos komencantoj por longa tempo...

Tial mi proponas nun shanghi nian tagordon. Kutime niaj kunvenoj pasas lau simpla modelo:

- Chu estas novajhoj? - kaj poste - Komencu lauvican programon!

Tion mi ne volas aboli, sed antaue paroli pri novajhoj kaj realigi la elektitan programon mi proponas instali nur unu novan programeron, proksimume kvin ghis dek minutojn por ekzercado:

1. La lauvica jhauda gvidanto demandas:

- Kiu havas materialon por nia ekzercado? -

Nun aperas, espereble, preparita malgranda teksto por chiuj partoprenantoj kaj sekvas la demando:

2. - Kio volas lautlegi tiun tekston? -

Se la teksto estas sufiche longa ech du personoj povas legi ghin. Kaj, eventuale la prononcado estas plibonigita. Poste sekvas la demando:

3. - Chu estas nekonataj vortoj en chi tiu teksto? - kaj

4. - Kiu volas esperantlingve klarigi tiujn vortojn? -

Se necese, la vortoj estas tradukitaj kaj eventuale la tuta teksto estas tradukita en la germanan lingvon.

5. - Kiu volas esperantlingve paroli pri la enhavo de la teksto? -

Tiu lasta demando ebligas plua ekzercado, sed nur, se la programo, kiu sekvas nun, tion permesas.

Mi esperas ke chiu klubano ne nur akceptas mian proponon, sed ankau preparos de tempo al tempo novajn interesajn tekstojn por nia ekzercado. Ni povas serchi en diversaj libroj, gazetoj, leteroj k.t.p. .....

Klaus Friese

Enhavo

HES decidis

Ankau en la nuna jaro la societo vivos lau la ghisnunaj kondichoj: Restos la Jhaudaj kunvenoj kaj deziroj por kontribuoj al ili, la eksteraj varbadoj kaj la financa situatico. Malgrau la kresko de la pozitiva saldo ni havus problemojn, se granda riparfakturo venus. Kvankam estas verdikto kontrau la shtelintino, ni ne baldau povos rehavi nian monon de shi. Ankau la membrokotizoj restos kiel ili estas.

Okazis novelektoj:

Revizoroj estas *Peggy Ley* kaj *Elsbeth Wielgus*.

La konsilantaro konsistas el *Johann Eitmann*, *Benno Klehr*, *Hella Lanka*, *Kai Pöhlmann*, *Sylvia Pöhlmann* kaj *Jutta Sültz*.

La klubo havas novan estraron. Tamen ghi ne estas tiom nova: la ghisnunaj membroj estis reelektitaj krom la kasisto, kiu eksighis pro profesiaj sharghoj. La estraro kore dankas al *Kai Pöhlmann* pro lia bona laboro. La nova kasisto estas *Frank Merla*, kiu antaughojas la kunlaboron kun *Heike Hagen*, kiu kiel freshbakita estraranino plu zorgos pri la kontanta kaso kaj respondecos pri kuirejprovizaj kaj mastrumadaj aferoj.

Enhavo

Printempa purigado

Espereble la printempa suno nun pli kaj pli palpebrumos tra la fenestroj, ankaû en la klubejon. Kvankam ni havas diligentan purigistinon, tamen ekzistas kelkaj anguloj kaj lokoj, kiujn shi regule ne devas tushi (ekzemple la magazeno, la internoj de fridujoj kaj forneloj ktp). Chu la suno rajtas trovi ilin? Kompreneble ne! Do, ni planas printempan purigadon kaj petas volontulojn kunlabori. Se vi pretas, Sabaton la 8an de Aprilo, je la 12a horo, surmeti antautukon kaj kauchukajn gantojn, bv. baldau anonci vin persone au telefone che mi: Heike Hagen (tel. vespere: 54 31 05). Mi kunordigos la purigadan kunvenon. Por ke la laboro ne nur superu, ni ofertos poste agrablan restadon kun kafo kaj kuko. Jam nun dankon por via subteno!

Heike Hagen

Enhavo

Nia programo

Aprilo	Majo
6 Kunsido de la Landa Ligo **8 12-a Printempa purigado** **13 Literatura vespero** Pachjo kio estas rasismo **20 Ovokunveno** kunportu ovojn+kukojn! **27 Video:** Mazi en Gondolando	**4 Preparo de la informstando** **6/7 informstando sur la urbodoma placo kadre de la Europa semajno** **11 Werner Bormann:** Neue Schwierigkeiten bei den Sprachen **Gerhard Hein:** Brauchen wir ein europäisches Bürgerrecht auf Verständigung? **Librovendado** **18 Video:** Mazi en Gondolando **25 Gerald Roemer:** moninvesto: prospero kaj risko
Estrarkunsidoj	**Datoj de agado**
6-a de Aprilo, 18-a horo 18-a de Majo, 18-a horo	1-a ghis 3-a de Junio: Katolika Tago 17-a de Junio provleciono 25-a de Aug. ghis 3-a de Sep: Vi kaj Via mondo

Enhavo

LA 22-a ^CEBALTA ESPERANTISTA PRINTEMPO MIELNO (PL)
30-a de Majo ghis 11-a de Junio 2000

Pola Esperanto-Asocio, filio en Koszalin, organizas internacian feriadon por esperantistoj kaj naturamantoj. La arangho okazos en la atrakcia kaj tre charma ripozloko Mielno, pitoreske situanta inter la Balta Maro kaj Jamno-lago, 12 km nordokcidente de la distrikta urbo Koszalin.

La programo de ^CEP antauvidas interesajn prelegojn kun videofilmoj, konkursojn kun valoraj premioj, chiutagan lingvoperfektigadon, sunumandon, busajn ekskursojn al vizitindaj lokoj, bivakfajron ktp. Esperantistoj el diversaj landoj havos okazon prezenti propran programon kadre de la naciaj vesperoj. Ni petas kunporti diversajn esperantajhojn por planata aukcio.

Loêloko: belega kaj moderna ripozcentro „Grazyna“ en la centro de la urbo Mielno, nur 50 m de la strando kun du- kaj trilitaj chambroj kun banchambro, televidilo, radio kaj telefono.

Partoprenkotizo 280 $ (au egalvaloro) - aligho ghis 2000-03-30, 300 $ - aligho ghis 2000-04-30.

Korespondadreso: Pola Esperanto-Asocio, Box 30, 75-016 Koszalin-1 (PL); telefono: 0048/94/3404-563 (petu: S-ron Baranowski)

Detalojn pri alighilo, alighmaniero kaj estintaj tiaj renkontighoj demandu che *Wolfgang Löbel*, Telefono: 040-536 54 32.

Enhavo

Esperanto en urba biblioteko

Kijlo. Dum Marto 2000 okazos Esperanto ekspozicio en la Urba Biblioteko de Kiel en la kvartalo Gaarden. La chefbibliotekistino proponis al *Sabine* kaj *Christian Darbellay* elmontri ion pri Esperanto dum unu monato.

Sur tablo unukvadratmetra che la enirejo al la librobretaroj estas disponitaj kelkaj lernolibroj kaj vortaroj, iom da literaturo kaj fakaj libroj. Granda afisho che la apuda kolono altiras la atenton de chiuj preterpasantoj, kiuj povas trafoliumi la librojn kaj preni interalie la Hamburgan prospekton kaj la informilon de Esperanto-Kiel.

5-a Hansa Esperanto-Tago en Kijlo

Kijlo. La 5-a Hansa Esperanto-Tago okazos en Kijlo dum Pentekosto, t. e. 09-06 ghis 12-06-2000 kun la temo “Lingvo kaj arto chirkau la Balta Maro”.

Oni elektis hotelon, kiun pluraj jam konas, kiuj partoprenis la geedzighfeston de *Sabine* kaj *Christian Darbellay* dum autuno 1997. Char la domo estas tre malmultekosta kaj plachis al chiuj oni decidis reiri tien.

En la provizora programo estas antauviditaj: interkona vespero, prelegoj kaj diskutrondoj, ekskurso, festa vespermangho, distra vespero kaj unu libera posttagmezo, kiun vi povos uzi por memstare malkovri Kijlon kaj la chirkauajhon.

La kotizo, kiu inkludas la kompletan programon inkl. de la ekskurso, chiujn manghojn kaj 3 tranoktojn de vendredo vespere ghis lundo posttagmeze, estas inter DEM 210 kaj 255.

Varbilon/alighilon bv. peti de Esperanto-Kiel, Johannesstr. 54, D-24143 Kiel, Fon/Faks. 0431/73 77 88.

Enhavo

Re al Esperanto en Hamburg